WIKIPEDIA

Gila lingvo

La Gila lingvo estas Kaspia lingvo, kaj membro de la nordokcidenta irana lingvo branĉo, parolita en Irano 'Gilan' Provinco. Gilaki estas proksime rilatita al Mazandarani kaj la du lingvoj havas similan vortprovizoj. La Gilaki kaj Mazandarani lingvoj (sed ne aliaj iranaj lingvoj) dividas iuj tipologia karakterizaĵoj kun kaŭkazaj lingvoj (specife Sud kaŭkazaj lingvoj), reflektante la historion, etna identeco, kaj proksime parencecon al la regiono de Kaŭkazo kaj kaŭkazaj popoloj de la Gilaki personoj kaj Mazandarani personoj .

La gila lingvo havas radikojn en la plej antikvaj iranaj lingvoj ĉefe en la nord-pahlavia lingvo. En la gila lingvo troviĝas substrataj vortoj, kiuj rilatas al la erao antaŭ de okupo de ariaj triboj (bordoj de la Kaspia maro estis loĝitaj eĉ antaŭ la enmigro de ariaj triboj).

La gila lingvo ne havas propran alfabeton. Aŭ se ĝi iam pratempe havis, pro la ĉiam pluva vetero kaj multa humido restis nenio, kio pruvus ekziston de tia alfabeto. Prkosimume ĉiuj giloj povas paroli en la persa lingvo kaj faras tion, kiam postulas oficialaj bezonoj. Sed inter si mem la giloj nepre parolas gile.

La gila lingvo havas kelkajn dialektojn.

Jen gila fonemaro laŭ latina ordigo: (ĉiuj ne klarigotaj literoj prononciĝas kiel esperantaj literoj):

Gila lingvo	
گیلکی *gilaki*	
Parolata en	provincoj Gilano kaj Mazandarano de Irano
Parolantoj	3 000 000
Denaskaj parolantoj	Taksitaj 3,3 milionoj (kun tendenco de malplimultiĝo)
Skribo	araba alfabeto
Lingvistika klasifiko	
Hindo-Eŭropa	
Hindoiranaj lingvoj	
Iranaj lingvoj	
Gila lingvo	
Lingvaj kodoj	
Lingvaj kodoj	
ISO 639-3	glk
Glottolog	gila1241
Angla nomo	Gilaki
Franca nomo	gilaki

A – Ä (kiel *a* en la angla vorto apple) – E – Ë (kiel *e* aŭdebla inter t kaj l en la angla vorto bottle) – O – Ö (kiel turka aŭ germana Ö) U – Ü (kiel Ü en la turka aŭ germana aŭ hungara alfabetoj) – – B – Ĉ – D – F – G – Ĝ – H – Ĥ – I – J – Ĵ – K – L – M – N – P – Q (iom simile al la prononco de R ĉe francoj aŭ germanoj) – R – S – Ŝ – T – V – Ŭ – Z

Jen kelkaj originaj gilaj vortoj:

Absorbo *Fakëŝ*
Absurda *häĉi*
Aĉeti *hen*
Aglo *aluĥ*
Akvo *oŭ*
Alo *bal*
Alno *tuse*
Amaso *amas*
Arbo *dar*
Bofilo *zama*

Bukcinatoro *ĝul*
Cikonio *ĉoin*
Fajfo *ŝib*
Fali *këtën*
Folio *vëlg*
Frato *brar* (kp. germane *Bruder*)
Gejŝo *giŝa – gejŝë*
Glita *lisk*
Granda *pillë*
Gumo *vinĝë*
Haltu *bes*
Histriko *ĥorika*
Ido *zaj*
Kaldrono *gëmëĝ*
Kato *piĉa*
Klimakso *gup*
Pasero *ĝiĝaj*
Koto *ĉël*
Patro *per* (kp. france *père*)
Patrino *mar* (kp. france *mère*, hispane *madre*)
Perdo *avir*
Plugilo *gaĝme*
Rano *goska*
Serpento *lanti*
Sur, super *buĝor*
Ŝnuro *lafënd*
Tuso *ĥos*

La signoj de pluralo estas N , ON , KON :

Goska – GoskaN
Brar – BrarON
Ĝiĝaj - ĜiĝaKON

Pronomoj:

mi=*mu*
ci=*tu*
li,ŝi,ĝi=*un*
ni=*amu*
vi=*ŝumu*
ili=*uŝën*

Jen kelkaj frazoj:

Mia patro venis : *Mi per bamo*
Mia patrino aĉetis panon : *Mi mar nan bihe*
Haltu! Ne iru el tiu vojo : *Bes ! u ra nuŝu*
Kies lingvo estas Esperanto? : *Esperanto ki zëban isë?*
Kie estas via frato? : *Ti brar koj isa?*
Mia frato estas en Germanio : *Mi brar Alman isa*
Kion faras li tie? : *Uj ĉi karë?*
Fariĝas doktoro : *Doktor borë*
Kiom kilometroj estas inter Raŝt kaj Tehrano? : *Rëŝt ta Tehran ĉänd kilumetr isë?*

Ekzemplo de la nova kvarversa poemo de la nova Gila literaturo:

شوروم نیشتن شوره ونگه چومونه ŝurum niŝtán ŝurë vëngë ĉumonë

شوروم اشکل شوکومه تاسیونه ŝurum áŝkël ŝukomë tasiyonë

شوروم نیشتم می چومونه بوشوری ŝurum niŝtem mi ĉumonë buŝuri

شوروم ارسو فوکونه می زاکونه ŝurum ársu fukunë mi zakonë

Eksteraj ligiloj

- informoj de la retejo "etnologo" pri la lingvo (http://www.ethnologue.com/show_language.asp?code=glk) (angle)

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Gila_lingvo&oldid=6825276"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 17:23, 3 jan. 2020.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.